



BULTENO
DE

Malaga
Esperanto
Grupo

La Cenaĉero

n-ro 6

januaro-februaro

jaro 1985

PASON POST PASON

Akorde kun la promesoj faritaj rilate al la Meza Kurso de Esperanto, AEU pretigis koncernaj "NOTOJ pri gramatiko, Historio de la Literaturo kaj Historio de la Movado". Ili respondas ĉiujn programerojn de la menciita kurso kaj, tial, konsistigas mirindan rimedon por arangi neprajn konojn pri Esperanto. Ekde nun estas mendeblaj ĉe Esperanto-Grupo de Málaga.

Komprenoble, tiuj notoj ne elĉerpas la respondajn konojn. Ili konsistas el nepraj informoj pri la temoj cititaj en la Programo. Tamen, kaj malgraŭ tio, ĉi notoj nepras pro facile lerni la minimumon postulitan por sukcesi.

Plie, mi insistas pri la neceso koni kaj studi rekte almenaŭ unu verkon el ĉiu aŭtoro por asimili efike la koncernajn sciigojn. Aliflanke, konvenas legi, kiel eble plej, pri gramatiko kaj la Movado. Ĉi-cele en Bulteno de HEF, Katolika Esperantisto kaj La Cenaĉero oni aperigis malgrandan liston da verkoj por havigi al ĉiuj samideanoj la ŝancon informiĝi rekte kaj konkrete pri la programeroj.

Ni atendas multe el ĉiuj kaj, unuavice, el respondeculoj de la Grupoj de Andaluzio. Ni fidas ilin ĉar ni scias pri ilia en-

(Daŭrigas en la 5-a paĝo)

NIA GRUPO

Saluton al ĉiuj, kiuj kuraĝis eniri en la novan jaron!
Ne estas multaj la novaĵoj okazintaj dum la lastaj du monatoj.

Por komenci ni diru, ke ĝis nun neniu mortis pro la plialtigo de la kotizo; eĉ pli, la nombro de niaj membroj kreskas kaj ankaŭ, do, la eldonado de nia "Cenaĉero" (ni jam publikigas sepdek numerojn). Krom ĉio, komencis aperi mistere, enmurigitaj afiŝoj similaj al ĉi tio:

SERĈATA

Viva aŭ mortinta



Pro plialtigo de
kotizo ĝis 150 pes.!!!

O N I R E K O M P E N C O S

fare de la plej veteranoj, preskaŭ certe. Nia kasisto ne ĉeestas niajn kunvenojn antaŭ du semajnoj...

Nova elementa Kurso komenciĝis la pasintan Januaron, ĉi-foje gvidata de samideano Enrioue Hurtado. Ĝi okazas Lunde, Merkrede, kaj Vendrede, de la 8a ĝis la 9a vespere.

Dum du semajnoj vizitas nin belgaj Esperantistoj (s-roj Fichet-Jacouet), loĝantaj nuntempe en Fuengirola. Ili rakontas al ni interesajn sciigojn pri siaj spertoj dum la pasinta Universala Kongreso.

Ĝis la venonta numero!

La Grupo

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

LA MOVADO

Malgraŭ la diversaj klopodoj de la estraro de Hispana Esperanto-Federacio pri la translokiĝo de la sidejo de la Federacio al Alikante, pri kio oni informis en la raporto de la estraro de H.E.F. aperinta en numero de BOLETIN, oni informas ke la sekretario de la Grupo de Alikante, s-ano Francisco Sánchez Antón, sciigas ke finfine ne eblas tiu translokiĝo, ĉar ili ne sukcesis trovi la taŭgajn membrojn por la nova estraro.

Daŭrigante la kontaktojn, la estraro de H.E.F. akceptis la proponon de Barcelona Esperanto-Centro por translokiĝi la sidejon de H.E.F. al la urbo Barcelona.

Kun la celo ke la agado de la Federacio ne interrompiĝu dum la jaro 1985, oni akceptis, provizore, ĉi tiu proponon, ĝis kiam, laŭ la Statutoj, la ĝenerala Kunsido de H.E.F. kunvenonta en Kartagena aprobu ĝin.

La nova estraro konsistos el:

PREZIDANTO.- S-ro Salvador Aragay i Galvany

VICPREZIDANTO.- S-ro Luis María Hernández Yzal

SEKRETARIO.- S-ro Víctor Ruiz Rodríguez

VICSEKRETARIO.- S-ro Josep Miranda

KASISTO.- S-ro Joan Font

Ĉefredaktoro de Boletín: S-ro Giordano Moya Escayola

Balmes, 38

TERRASA (Barcelona)

De nun la adreso de la Federacio estas:

Carreras Candi, 34-36

08028 BARCELONA

Pri la konto por sendi la kotizojn

CAJA DE PENSIONES PARA LA VEJEZ Y DE AHORROS

AG. Riera Blanca 436, Libreta nº 2303-26

08028 BARCELONA

OXO-OXO-OXO-OXO-OXO-OXO-OXO-OXO-OXO-OXO-OXO-OXO-OXO-OXO-OXO-OXO

La adreso de la LKK de la "45a Hispana Kongreso de Esperanto"

estas: Esperanto-Grupo "KARTAGO NOVA"

Juan Fernández, 13, 8ª izda.

Cartagena (Murcia)

FERNANDO DE DIEGO

Ci verkisto loĝanta en Zaragoza (Hispanio) elstaras pro sia tradukemo. Ĉar lia privata vivo ne enhavas specialan gravecon, mi rimarkos nur liajn tradukojn kaj originalaĵojn.

Tradukoj:

"La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha", de Miguel de Cervantes. Eble la plej bona romano de la monda literaturo.

"Doña Bárbara", de Rómulo Gallegos. Grava romano de la hispan-amerika literaturo.

"Hispana Poezio", diversaj aŭtoroj.

"Krado-mondo", de Encarnación Ferré. Temas pri verko de nuntempa hispana aŭtorino. Premiita romano pri la psiko de virino en malliberejo.

"Boule de suif", de Guy de Maupassant. Tradukita el la franca. Enhavas enkondukan eseeton de Waringhien.

"Viveroj", de Alfonso Rodríguez de Castelao. Traduko de "Retrincos", grava verko de la galega literaturo.

"Hispana Liriko", Veremundo Méndez Coarasa. Tradukita el la hispana.

"Kun sopira koro", de Gustavo Adolfo Bécquer. Originala titolo: "Rimas".

"La lando de Alvargonzález", de Antonio Machado.

"La cigana romancaro", de Federico García Lorca.

"La arbo de la sciado", de Pío Baroja.

"Contes Drolatiques", de Balzac.

"La familia de Pascual Duarte", de Camilo José Cela.

Originalaĵoj:

"Nuevo Método de Esperanto".

"Pri esperanta kritiko".

"Pri esperanta tradukarto".

JUAN REGULO PEREZ

Profesoro en la Universitato de La Laguna (Tenerife), kie ankaŭ lecionas Esperanton en la respondeca katedro. Li estas fakulo pri Hispana Lingvo kaj pri Historio, krom pri Esperanto. Faris

lekciojn ĉe ISU (Internacia Somera Universitato). Li estas Akademiano de la respondaj Akademioj hispanaj kaj de tiu de Esperanto.

Li estigis la eldonejon "Stafeton" (1952) kaj ĉefrolis en la aktiveco post la Dua Mondmilito, lanĉante la poetojn kaj preskaŭ ĉiujn prozverkistojn de la Skota Skolo, t.e., de la literaturista grupo kiu rigardas sin ideo kiel sekvanton de la antaŭa "Budapesta Skolo".

Li kunlaboris en la simpozio pri la ata-ita demando, redaktante ĝin. Verkis multnombrajn studojn pri lingvaj kaj esperantologiaj problemoj kaj disponigis materialojn aŭ sugestis por la redaktado de "Esperanto en Perspektivo".

Andrés Martín

(El la 1-a paĝo)

tuziasmo kaj kapableco. Tiel estu, ke la venonta "3-a Andaluza Kongreso" brilu pro la nombro da samideanoj sukcesantaj en la ekzamenoj.

Andrés

-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xo

ANONCO

Kiam vi venos al Malago (Hispanio) ne forgesu ĉi adreson:

Hostal Residencia LA HISPANIDAD

Explanada de la Estación s/n

29002-MALAGO (Hispanio)

Telefon-numero: 31-11-35

Temas pri komforta gastejo, malmulte kosta kaj kun mastro paŝrolanta Esperanton. Plie, ĝi troviĝas apud trajna stacidomo.

x-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-xox-x

CITAJO

"Instruu al viaj filoj ke ni instruis al niaj ke la tero estas nia patrino.

Tio kio okazas al la tero okazos al la filoj el la tero. Se la homoj kraĉas sur la tero, ili kraĉas al si mem."

Indiana Ĉefo Seattle

LETEROJ AL LA DIREKTORO

Al la direktoro de la "Cenaĝero":

Dankon por aperigi ĉi tiun leteron ene de via (laŭ nia opinio) bona revuo. Mi, nome de mia kolego Rupérez kaj de mi mem, nur intencas senkulpiĝi nin antaŭ sinjoro Andrés ĉar nia celo, pere de la letero aperigita antaŭ du numeroj, ne estis kulpigi lin aŭ iun ajn speciale sed denunci la ĝeneralan apation, kiu invadas nian grupon. Denove dankon.

Nikima

Estimata Direktoro: Antaŭ ĉio, mi esprimas la ĝojon, kiun kaŭzas al mi la vigla ekfunkciigo de ĉi tiu sekcio fare de niaj legantoj.

Mia dua intencoo estas klopodi klarigi kelkajn punktojn el la du lastaj leteroj aperigitaj. Unue, mi diras al sinjoroj Rupérez kaj Nikima, ke se nia grupo ne funkcias (laŭ ili diras) pli bone, estas ĉar ĝi ne havas sufiĉajn membrojn aktivajn. Vidu, ke preskaŭ ĉiuj membroj (almenaŭ la plej veteranoj, kiuj estas la plej kutimiĝitaj al grupa laboroj) havas sur si ĉefajn postenojn. Do ĉe ili proponas iun fakan agadon ili mem devas plenumi ĝin preskaŭ solaj. Alie, mi opinias, ke ni ne funkcias tiel malbone...

Due, mi akre defendas la ĵusan plialtigon de la kotizo, kaj ankaŭ la (eblajn) venontajn. 150 pes. estas preskaŭ nenio se vi observas atente niajn multnombrajn elspezojn. Ne pretendu profiti ekzemple bonan bibliotekon (libraron kaj revuaron) se neniu pagas ĝin. Kunligante kun la letero de samideano Andrés, mi diru, ke multaj bonaj projektoj ne realiĝas pro manko da tempo ĉe la realigontoj. Rilate la Kurson por infanoj, mi tute kulpas ĉar mi devis pretigi la propagandon sed por la antaŭcitita kialo, oni ne faris ĝin kaj la kurso malfunkciis. Pri la internaj kursoj vendrede mi denove parolas pri la tempo: ne ĉiuj samideanoj ĉeestas vendrede ĉar iliaj okupoj ne permesas tion. Por tio la plej bona epoko estas somero. Mi bedaŭras diri ĉi tion, ĉar por praktikado ĉiam devus esti bona momento. Mi povus diri eĉ pli, sed eble ne estos loko en la revuo por ĉi longa letero Dankon.

Rafael López Castilla

JUNULARA ANGULO

Saluton gejunuloj!

La monato Aprilo alproksimiĝas kaj denove nia sekcio nepre estas dediĉita al HEJS-Renkontiĝo okazonta dum la citita monato.

Malmulta tempo disponeblas kaj ankoraŭ la laboro ne finiĝis. Preskaŭ certe ni presos bildkarton aludantan al la Renkontiĝo. Sube oni povas vidi la priparolitan desegnon faritan de Adolfo Romero Ruiz, tre bona desegnanto (ne estas samideano), kiu tre sindoneme, akceptis krei por nian belan bildon.

Nuntempe ni estas laboranta en la ellaboro de eta Renkontiĝa Libro, kiu enhavos programon kun la pritraktotaj temoj. Sugestoj bonvenataj!

Ankaŭ ni devas komuniki, ke eble nia kunvenejo ŝanĝiĝos kaj jam ne estos la sidejo de la Kultura Asocio GfU sed la Priprofesia Lernejo "Franco". Tiu loko respondas pli bone al niaj necesajoj ĉar disponigas al ni duŝojn, necesejojn, dormejon, (ĉiu alportu litsakon aŭ aermatracon), kaj kunvenejon. Tiu lernejo troviĝas apud la urba centro.

Farenda kaj urĝa afero estas ankaŭ sendado de aliĝiloj al la ĉefaj grupoj kiuj, kutime, partoprenas ĉi tiun Renkontiĝon. Pri tio ni jam okupiĝas.

Rafael.



SCIENCA PAĜO

KVAZAROJ

De Rafael López Castilla

(Daŭrigas de la pasinta numero)

Ni diru ĉi tie ke la lumaj, radiofoniaj kaj iksoradiaj signaloj, kiuj havigas al ni informon pri malproksimaj objektoj, vojaĝas per tre alta, sed ne infinita, rapido: la luma rapido. Tio signifas, ke dum unu jaro la signalo povas fari 9⁵ bilionojn da kilometroj, tio estas, unu lumojaro. Tiamaniere, ekzemple, la plej proksima galaksio, kiun ni povas vidi estas Andromeda, kiu troviĝas je 2⁵ milionoj da lumojaroj kaj pro tio ni vidas ĝin kiel ĝi estis antaŭ 2⁵ milionoj da jaroj.

Traserĉante, do, en la malproksimaj limoj de la spaco, je miloj de milionoj da lumojaroj de distanco, ni posteniras miloj de milionoj da jaroj en la tempo, kaj pere de tio, ni povas vidi tiun fajran balonon, kiu estis la Universo dum ĝia komenco, kaj tio, dank'al la radioondoj. Ĉi tiun ideon konceptis Robert H. Dicke, en 1964. Laŭ Dicke, ni povas enfokusigi la radioteleskopon en kiu ajn direkto kaj tiamaniere detekti ĝeneralan fundon de radiado. A.A. Penzias kaj R. W. Wilson, de la "Bell Telephone Laboratories" realigis ĉi tiun eksperimenton en 1965. Post forigi zorge ĉiujn radiostaciajn kaj mikroondajn dissendojn, ili trovis ankoraŭ ĝeneralan fundon: la eĥo de la Komenco Eksplozo.

La kvazaroj estas la atestantoj pli antikvaj, kiuj restas de tia eksplozo. Dank'al ili la astronomoj povas utiligi hodiaŭ rimedon por vidi la spacajn nevideblaĵojn: Tiu rimedo estas la radioondoj.

Bibliografio:

- "El Universo" de Isaac Asimov. Eldonita de Alianza Editorial
- "El Universo. Enciclopedia de Astronomía". Eldonita de SARPE. Dua Volumo.
- "Enciclopedia Visual Salvat". Eldonita de Salvat Editores, S.A. Sepa Volumo.

Kunlaboraĵoj

En ĉi tiu numero okupas ĉi paĝo letero el Japanio, deklaro al tiu kiu ni kuniĝas kaj deziras por nia lando kaj la tuta mondo.

LA DEKLARO DE LA GUBERNIO KANAGAŬA KONTRAŬ NUKLEAJ ARMILOJ,

La abolicio de nukleaj armiloj kaj realigo de la eterna paco estas sincera deziro komuna de ĉiuj de la popolo de Japanio, la unusola lando en la mondo suferinta pro nukleaj bombadoj. Ankaŭ ni, la gubernianoj de Kanagaŭa, asertas ĉi tiun fortan deziron de la japana popolo.

Hodiaŭ, kreskantaj internaciaj streĉiĝoj pro plifortigo de nukleaj armiloj minacas la mondpacon kaj eĉ la travivadon de la homaro. Ni do ne povas ne apelacii al popolo tra la mondo por la abolicio de nukleaj armiloj kaj por malarmado.

Protekti ĉi tiun belan landon por niaj infanoj kaj nepoj kaj postlasi al ili ĝuidan vivon estas niaj devoj.

Ni, la gubernianoj de Kanagaŭa, tial deklaras, ke la tri sep nukleaj principoj, "NE POSEDI, NEK FABRIKI, NEK ENLASI NUKLEAJN ARMILOJN EN JAPANION", adoptitaj de la Japana Registaro kiel fundamenta politiko de la nacio, fariĝis ankaŭ la politiko de nia gubernio.

la 5-an de julio, 1984.

NIA PETO: Tradukinte la deklaron en la anglan, francan, germanan, araban, rusan, ĉinan, portugalan kaj hispanan lingvojn, la gubernio Kanagaŭa sendis ĝin al jenaj: la landoj posedantaj nukleajn armilojn, la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, la UN-a konsilio por redukti armadon, Maryland en Usono, Liaŭning en Ĉinio, New South Wales en Aŭstralio, Götteborg en Svedujo, Penang en Malajzio, Singaporo kaj Baden-Württemberg en F. R. Germanio, el kiuj la lastaj sep havas amikan rilaton kun nia gubernio.

Ni, Jokohama Esperanto-Rondo decidis sendi la esperantigitan tekston al la delegitoj de UEA kaj al niaj korespondantoj por pli bone konigi la deklaron al la mondo.

Vi, kiuj ricevis la deklaron, traduku en vian nacian lingvon, kaj transdonu ĝin al via registaro kaj al via aŭtonoma gubernio aŭ prefektejo, ni petas. Kaj sendu viajn opiniojn kaj reeĥon al ni: JOKOHAMA ESPERANTO-RONDO

Adreso: 13-14 Saïdo 1-ŝoome, Koonan-ku,
Jokohano, 233 Japanio

LA HISTORIO ĜIS LA NASKIĜO DE LA DEKLARO: La deklaro estis aprobita en la 5-a de julio ĉe la asembleo de la gubernio Kanagaŭa. Ĝis nun estis nur du ekzemploj, ke la deklaro estis aprobita en la gubernia instanco, t.e. en Nagano kaj en Tokuŝima, kaj ili ambaŭ estis faritaj laŭ la propono de la asembleoj kaj oni vidas la ekzemplojn nur "la idea deklaro" de la asembleoj. Sed en la kazo de Kanagaŭa tio iel alie aspektas: Unue gubernio havas multajn militbazojn de Usono, kaj interalie al la haveno de Jokosuka lastatempe ankris la miltŝipo, kiu povus porti la nuklean armilon Tomahoko. En tia cirkonstanco multaj urbanaj grupoj kolektis ĉ. 1 400 000 subskribojn, kiuj esprimas sian malaprobkon kontraŭ Tomahoko kaj sian aprobon al la gubernia deklaro. Due la deklaron proponis ĉe la asembleo la guberniestro NAGASU Kazuĝi mem, kiu pozitive klopodis ĝis nun por "la interpopola diplomatio". Kaj antaŭ la realigo de la gubernia deklaro jam ses urboj en la gubernio faris sian deklaron kontraŭ nukleaj armiloj. Kaj nun estis farita la gubernia deklaro, sed bedaŭrinda kaj konsiderinda estas tamen la fakto, ke la deklaron malaprobis la Liberala Demokrata Partio, la registara partio de Japanio.

Post la asembleo la guberniestro parolis, "De nun mi klopodos vaste konigi la intencon de la deklaro interne kaj ekstere de la gubernio por ke multaj komprenu la deziron de la gubernianoj pri la abolicio de nukleaj armiloj."

Du monatoj post la deklaro, en la 5-a de septembro, estis farita la alia apelacio kontraŭ nukleaj armiloj. Tion faris "la kunveno de la urbestroj de Jokosuka, Kure, Sasebo kaj Maizuru", kiuj havis milithavenon en si ĝis antaŭ 30 jaroj.

Jokohama Esperanto-Rondo

1984-10-01

-xoxINTERNACIA PACOxox-xoxINTERNACIA PACOxox-xoxINTERNACIA PACO
PACOxox-xoxINTERNACIA PACOxox-xoxINTERNACIA PACOxox-xoxINTERNAC

"Ĝis la bela sono de l'homaro..."

(el la himno)

AMUZAĴOJ

Solvo al la enigmo de la pasinta numero:

La klerulo diris al la komercisto ke li envicigis la kameleojn kun ĝiaj korespondaj gvidistoj kaj oraj fandbrikoj kaj ke li numeris ilin de unu ĝis dek.

Sekve, la klera homo prenis unu fandbrikon el la unua gvidisto, du el la dua, tri el la tria kaj tiel plu, ĝis la deka gvidisto, el tiu kiu li prenis dek fandbrikojn. La komercisto pesis ĉiujn pro ordono de la klerulo.

Se ne ekzistus rabisto, la pezo devus esti 550 funktoj:


$$10+20+30+40+50+60+70+80+90+100=550$$

La numero da funktoj kiu mankis montris kiu el la gvidistoj ŝtelis la oron.

Se, ekzemple, la fandbrikoj prenitaj pezus nur 540 funktojn, la gvidisto de la deka kanelo estas la kulpulo, ĉar li nur povis redukti dek funktojn el la tuta pezo.

Se el la tuto mankus sep funktojn, la gvidisto numero sep estas la respondulo, do oni prenis sep fandbrikojn (ĉiu kun unu funkto malpli) el li.

XX



Ĉi tiu desegno ne havas sencecon. Komencu vian promonadon ĉe la hidraŭlika rado kaj sekvu la akvon en ĝia fluejo ĝis la akvofalo. La akvo kiu falas supreniras denove mirakle al la supra parto. Rimarku ke la du turoj ŝajnas havi la saman altecon; tamen, unu havas tri etaĝojn kaj la alia havas nur du.

Kion vi opinias?

Ĝi estas kurioza,

ĉu ne?

Dankon pro legi ĉi tiun revuon ĝis la fino kaj ĝis revido!

Granda Frateco Universal

STATUTOJ DE LA FONDAĴO "G.F.U." (Daŭrigas)

ARTIKOLO 5a.- Ece, la Fondaĵo estas kultura kaj scienca kultura agadprojekto tre socia kaj humana. Oni ekskludas tute la politikajn kaj/aŭ religiajn agadojn. Ĝiaj celoj estas ĉiam negativaj kaj altruismaj. Ĉi tiuj enhaviĝas ene de la jenaj fundamentaj normoj:

1.- La supereco de la spiritaj valoroj kvazaŭ regulo kontriganta la homajn celojn kaj valorojn.

2.- La praktikado de la TOLEREMO bazita sur la komprenemo por la evoluado de la tutmonda komunumo bazita sur la justeco, homamo kaj la harmonio kun la medio.

3.- La serĉado de la VERO per la esploro por la liberigo de la homa spirito, la mensa riĉigo kaj la materiala abundo.

4.- La defendo de la tutmonda PACO surbaze de la PACO de la persono efektiviĝita (ĉi tiu lasta) kvazaŭ aktiva kaj kreinta membro en sia socia medio kaj internaciskale.

ARTIKOLO 6a.- La Fondaĵo havas hispanan naciecon kaj ĝia domo domicilio troviĝas en Madrid, strato Carrero Juan Ramón, numero 3, 1ªA. La Plenuma Konsilantaro ĝin ŝanĝi poste, sed devige informos pri tio al la Sekcio de Fondaĵoj de la Ministerio pri Kulturo, por ĝia enskribo en la Registro de Privataj Kulturaj Fondaĵoj. La Fondaĵo, por la disvolovo de siaj taskoj, povas krei stablojn kaj dependaĵojn en aliaj urboj kiam pri tio konsentos la Plenuma Konsilantaro.

ARTIKOLO 7a.- La du fundamentaj celoj de la Fondaĵo estas:

1.- Instigi al fizika, psika kaj mensa plibonigo havigante al li konojn, sistemojn, metodojn kaj traserĉojn kiuj montru al li kiel vivi harmonie kun la naturo por trovi la sanon, la veron, la feliĉon kaj la pacon.

2.- Iniciati la fratecon inter homoj portante al la kolektivumo tolereman, veran kaj pacan mensaĝon kiu helpas disfali la seksajn, rasajn, kredajn kaj situaciajn barilojn kiuj disigas la personojn kaj landojn.

(Daŭrigota)